
Sed je tio mi subite ĉesis, ĉar mi ne de-

ziris lin humiligi, kaj ia aludo al okuloj certe estus malbonmoda. Tamen, kvazaŭ ne rimarkante mian konfuzon, li alproksimiĝis la maŝinon, kaj baldaŭ reaperis antaŭ mi, tenante en la mano malgrandan tubon, kiu estis proksimume trionon da metro longa, kaj havis diametron de unu centimetro. Ĝi estis farita el ia travidebla materialo, kaj havis je ĉiu ekstremo malgrandan limonkoloran kraneton. Interne oni povis vidi helbluan, preskaŭ violokoloran fluidon, kiu, kiam li turnis la tubon, malrapide glitis, kiel oleo, de unu ekstremo al la alia. Momenton li tenis vertikale la tubon, kaj zorge ekzameninte ĝin li diris:

"Mi bezonas proksimume unu *kraĉimpon* da fluida elektro. Ĉu vi povas diri al mi, kie mi povas ĝin ricevi?"

"Fluida elektro!" Mi denove ekkriis. "Mi jam diris ke mi neniam aŭdis pri tia aĵo. Mi neniam konis homon, kiu vidis pecon da elektro, aŭ kiu vere scias kie estas elektro."

Li min rigardis trankvile per du el siaj okuloj, dum la tria mediteme ĉirkaŭrigardis la pejzaĝon.

"Mi supozis ke certe mi povos ĝin ricevi tie ĉi, alie mi ne estus malsuprenveninta. Tamen," kaj nun li penseme rigardis la tubon. "Mi opinias ke mi havas sufiĉe por la vojaĝo. Se ne, tiaokaze mi devos pruntepreni de alia aviadisto."

"De kie vi venis?" Mi demandis, ĉar mi nun komencis kredi ke li estas freneza.

"De *Daĉnafraspontelo*," li respondis, "kaj mi veturas al *Fontelorankiĵo*. Kio estas la nomo de tiu urbo en la malproksimo?"

"Vaŝingtono," mi diris, surprizate je lia trankvileco kaj samtempa nescieco. "Mi neniam aŭdis," mi daŭrigis "pri tiuj urboj. De kiu lando vi estas enloĝanto?"

"Mi estas marsano," li diris, iom akre, "mi supozis ke la tuta universo scias ke *Daĉnafraspontelo* estas la ĉefurbo de la plej granda respubliko sur la planedo Marso."

"Kaj," mi respondis, indigninte, forgesinte pro kolero mian timon, "ĉu vi ne scias ke Vaŝingtono estas la ĉefurbo de Usono, la plej granda respubliko sur la tero?"

"Ho," li ekkriis, "do, ĉi tiu estas Tero? Mi supozis ke mi estas sur Vestio, unu el la asteroidoj. Mi estas veninta multe pli grandan distancon ol mi supozis. La etero sendube estas pli maldensa ol dum mia antaŭa vojaĝo."

Ekzameninte sian tubgradigilon, li daŭrigis:

"Mi havas suŭĉe da fluido por iri ĝis Venuso. *Fontelorankiĵo* estas iu urbo venusa. Ĉu vi jam tie vizitis? Ne? Nu, ĉu vi bonvole helpas al mi liberigi ĉi tiun fugilon?"

Duone svenante pro liaj trankvilaj diroj pri aferoj kiuj al mi ŝajnis tiel mirindegaj, mi lin helpis, mirante dume al mi mem, "Kiom estas *kraĉimpo* da fluida elekto?"

Facile ni duope rektigis la maŝinon, li realligis la fortotubon, poste li faris kelkajn provojn, per puŝbutono, kaj la flugilo ekfaris graciajn movojn. Iom reaklirinte mian egalanimon, mi sentis ke sci-volemo venkis mian timon, kaj mi demandis:

"Pardonu al mi, Sinjoro, sed bonvole informu min kiamaniere (se vi ja estas marsano, kaj neniam antaŭe staris sur la Tero) okazas ke vi tiel bone parolas la lingvon esperanton?"

"Ankoraŭ tiu sama vorto 'esperanto'," li penseme, sed afable diris, samtempe min fikse rigardante per ĉiuj siaj okuloj, "Esperanto," li fine daŭrigis, "persono kiu esperas,—sed la tuta homaro esperas. Kio estas tio, kion la poeto *Krinjampolo* verkis: 'Eterna estas la esper' en brust' homara.'"

"Ne, ne!" Mi lin interrompis kolere, "tio estas citata el la verkoj de nia poeto Pope! Pope' verkis angle:

'Hope springs eternal in the human breast!'

"Tio neniel min koncernas," li diris, kvazaŭ mi ne ekzistis, "*Krinjampolo* ĝin skribis antaŭ proksimume trimil centja-

roj. Sed, kiamaniere ĉio ĉi rilatas al la lingvo marsa?"

"La lingvo marsa!" mi ekkrilis, "Do, oni parolas tiun ĉi lingvon sur Marso?"

"Certe, kaj ankaŭ sur Venuso. Sed kial tio surprizas vin? Vi ankaŭ parolas la marsan lingvon."

"Jen kial!" mi diris, mirigite, "car ĝi estas nia internacia lingvo, elpensita de Doktoro Zamenhof."

"Elpensita de Doktoro Zamenhof," li ripetis, dum rideto aperis trans lia larĝa vizago, "Aŭskultu! La marsa kaj la venusa lingvo, kiun vi ĵus interparolis kun mi, jam ekzistas neŝanĝita de antaŭ dudek milionoj da jaroj. Via Doktoro Zamenhof supozas, eble, ke li ĝin elpensis, tio nur atestas ke li bone elfaris lingvon, kiu estis jam adoptita antaŭ milionoj da jaroj, kiel la sola perfekta lingvo."

Lia trankvila sed tute ĝentila maniero min silentigis. Li sidigis sur la seĝo de la maŝino, kaj post momento diris ŝanceliĝeme:

"Pardonu min, pro eble embarasa demando, sed,—ĉu vi bonvole diros al mi kio okazis al via tria okulo?"

"Nu," mi diris en mi mem, "tio ĉi estas nekredebla!" Mi restis tro embarasita por fari ian respondon, kaj rimarkinte mian konfuzon li diris afable:

"Pardonu, pardonu, Sinjoro, mi vidas ke tio estas al vi doloriga temo."

Kaj tuŝinte ian puŝbutonon, li rapide supreniris kun la maŝino, kiu baldaŭ estis ne plu videbla sur la blua ĉielo.

HENRY H. BARROLL,

Comdr. U. S. N.

"MAID OF ATHENS."

"Maid of Athens, ere we part"
(Observe this rare Byronic start).
You may not understand the rest
In English, so I think I'd best
My feelings in this way relieve:
Mi amas vin, ho mia viv'!

How oft I praised your eyes and hair,
Your cheeks so rosy, soft and fair.
Alas, you did not comprehend
One word of it from start to end!
The time I lost I'll now retrieve:
Mi amas vin, ho mia viv'!

O Maid of Athens, cease to speak
That complicated ancient Greek!
I'll lay aside my English, too—
I've found a better way to woo:
O love, these ardent words believe,
Mi amas vin, ho mia viv'!

I. K. R.

LA UTILECO DE ESPERANTO POR LA KOMERCO

Pro la sekvanta traktato, la aŭtoro ricevis de la Washington Komerca Cambro 20 spesnilojn, kiel premion de la Literatura Konkurso de la Sesa Internacia Kongreso de Esperanto.

TURNANTE niajn okulojn malantaŭen sur la evolucio de la homara kulturo ni observas, ke unu el la plej gravaj iloj, kiuj levis nin al tiel alta ŝtupo, estas la komerco. En la komenca stato de la kulturo la komerco estis nur intersanĝo de nutraĵoj, vestaĵoj kaj iloj; ĝi servis nur al plej simplaj bezonoj.

Kiam la popolgentoj kreskis, la laboroj dividiĝis pli kaj pli. Fariĝis specialaj metiistoj, kiuj produktis la diversajn bezonaĵojn de la homoj. Kiam ne estis plu eble al la metiistoj mem prizorgi la disdonon de la produktaĵoj kaj trovi la personojn ĵus bezonantajn ilin, specialaj personoj prenis sur sin la taskon de la intersanĝo, kaj jen fariĝis la metio de la komercisto. Eble komence la komercisto nur intencis servi al la kunuloj, forprenante la objektojn de la produktanto por alporti ilin al la konsumanto. Pro tiu ĉi laboro li meritis rekompencojn, ĉar li ankaŭ havis la devon obei al la ordonoj de la stomako.

Tiamaniere la komercisto jam faris kulturlaboron: li aliformigis la laboron de la metiisto en panon. Vidinte, ke per sia laboro li povas gajni profitojn, la komercisto klopodis pligrandigi la kampon de sia agado. Li lernis eksciti bezonojn ĉe homoj, kiuj tiajn ĝis nun ne konis. Aliflanke li trovis ĉe fremdaj popoloj aĵojn, kiujn li ĝis nun ne ricevis de siaj liverantoj. Tio kaŭzis lin instigi la metiistojn ke ili produktu la deziratajn objektojn. Tiamaniere li donis novajn ideojn al la hejmaj fabrikantoj kaj fruktodonigis ilian entreprenforton. De malproksimaj fremdaj landoj la komercisto alportigis krudajn naturproduktaĵojn tie preskaŭ senvaloraĵajn, kaj li aliformigis de ili objektojn fariĝintajn nun necesoj de la plikulturgitaĵoj homoj kaj artaĵoj por ĝojigi la vekigintan belsenton.

Kaj la sencese kreskanta komerco necesigis bonajn stratojn, transportilojn, ŝipojn; li elpensigis la vapor-kaj elektro-

maŝinojn, telegrafon kaj telefonon, kaj, ho ve! por sin protekti kontraŭ malamiko, li kreis ankaŭ la mortportantajn paflegojn, la minacantajn militŝipojn. Rondirigu viajn okulojn en via urbo, en via lando, en la tuta mondo: ĉio, kion vi vidas servanta al la belo, al la bono, al la esploro de la vero, ĉio estas unuavice la produkto de la komercospirito. Utiligante la aĵojn kaj cirkonstancojn al si mem, ĝi utiligis ilin por la tuta homaro. Tial ĝi estas la kreinto de la industrio, de la grandaj ŝip-kaj fervojlinioj, de la arto, de la scienco, de nia tuta kulturo.

La komercospirito donis la senripozajn vivospiriton, kiu nun trafuas tra la animoj de la terpopoloj; kvankam ofte samante malpacojn, malamon, malkomprenon inter la homoj, ĝi tamen kondukis ilin fine al la stato de komencanta perfekteco, en kiu ili ekkomprenas, ke floranta komerco kreas nedissolveblajn ligilojn inter la popoloj, ke ĝi alproksimigas la naciojn, ke ĝi donas al ili samajn interesojn. Kaj fine tiuj ĉi komunaj interesoj devas naski en la cerboj de la homoj la penson kaj konvinkon pri la unueco de la homaro. Ĉu tiu ĉi aspekto ne devas enrevigi nin, ke per la komerco ni atingos estonte la plej altan ŝtupon de la kulturo, de la perfekteco, de la eterna paco?

Certe, saĝe kondukate kaj purigite de la skorioj ankoraŭ algluataj, la komerco povas esti tiu ĉi ilo, ĝi povas esti la digna helpanto de la esperantismo, kiu celas konduki la homaren al tiuj altaĵoj per sia propra interna nobla forto spirita, ne postulanta utilon por si mem. Por akiri la revitan perfektecon, necesas ke la spirito de komerco estu penetrata de la esperantismo. Se ĝi volas fraternecon inter la popoloj, ĝi bezonas pleniĝon de la interna alta ideo de la esperantismo, de la altruismo, kiu scias, ke la propra bonstato nur povas prosperi per la zorgo pri la bonstato de ĉiuj kunfratoj.

Jes! mi scias: tiu ĉi bela penso nun-

tempe estas nur revo, kaj ĝi restos revo ankoraŭ dum kelka tempo. Kiu scias kiel longe? Sed revoj ne devas resti ĉiam nur malplenaj pensoj; ili devas fariĝi faktoj, des pli, kiam la pensoj naskiĝas en la cerboj de serioze pensantaj viroj, de viroj, kiuj havas la volon al faro. Tiam la revoj estos faktoj. Ĉu la historio de la industrio de la lastaj jardekoj ne donis sufiĉajn pruvojn pri la forto de homa spirito, kiu efektivigis la plej sentimajn pensojn antaŭe apenaŭ elpenseblajn? Germana bankisto vojaĝanta antaŭ kelkaj jaroj en Usono nomis tiun ĉi landon la lando de senlima eblecoj. La sukceso de la Sesa Kongreso montru al la mondo, ke Usono meritas tiun nomon efektive, helpante per forta brako efektiviĝi la grandiozan elpensajon de majstro Zamenhof, la celon, ke unu ligilo interligu ĉiujn naciojn de la mondo.

Kiel mi jam montris pli supre, la homaro jam troviĝas senkonscie sur la vojo interligi la popolojn per la forta ligilo de la komerco. Tamen al ĝia plena forteco mankas io eble ankoraŭ pli forta. Tio estas la jam dirita alta interna ideo, la Esperantismo kaj ties ekstera vesto, la internacia lingvo Esperanto.

Estas fakto, ke la komerco spinas fortajn fadenojn ĉirkaŭ ĉiuj nacioj kaj landoj de l' mondo. Jam la plej malproksimaj anguloj de l' tero estas entiritaj en la reton de la komerctráfico. Al la plej dezertaj lokoj marŝas la pioniroj de la komerco, samtempe reprezentantoj de la kulturo. Gravegaj geografiaj baroj amasiĝas antaŭ la piedoj de l' pioniroj; la pioniroj ilin venkas, ofte pagante la venkon per la vivo. Alia pli grava baro estas la diverseco de la lingvo. Ankaŭ tiun ĉi baron la komerca spirito provas venki. La plej progresemaj pioniroj klopodas lerni la lingvojn de la vizitotaj fremdaj landoj. Per longa pena laboro kelkaj el ili sukcesas posedi perfekte kelkajn lingvojn. Nun ni rigardu en la kontoron de iu ajn granda eksportfirmao, kiu ĉiam klopodas pli-grandigi la rondon de la landoj, al kiuj ĝi intencas sendi la produktaĵojn de la enlanda industrio. Jam ne sufiĉas la ĉefaj kulturlingvoj eŭropaj. Oni interrilatas kun slavaj, nordaj, malproksimaj orientaj landoj, en kiuj oni konas nur malmulte de la angla, franca aŭ germana lingvo. Por interkompreniĝi kun la popoloj, por vendi al ili la komercaĵojn, la eksportisto

devas uzi ilian lingvon. Neeble estas al li lerni mem la ĉiam kreskantan nombron de la lingvoj, preskaŭ neeble estas trovi anojn de sia propra lando, kiuj sufiĉe bone konas la lingvojn de la flankaj landoj, por fari la korespondadon aŭ vojaĝe vendi la komercaĵojn. Li nun devas dungi anojn de la fremdaj landoj konantajn iom la enlandan lingvon. La komercisto diktas la leterojn en sia lingvo, la fremdlandano tradukas, sed la ĉefulo, ne povante kontroli la ĝustecon de la traduko, tamen devas aprobi ĝin per sia subskribo. Sama estas la situacio, kiam oni tradukas la fremdlingvajjn leterojn nacilingven; gravaj eraroj povas naskiĝi, kiuj estas la fonto de grandaj perdoj. La fruktoj de pena longa laboro povas parte esti nuligitaj.

Por efike proponi kaj prezenti la komercaĵojn al la fremduloj, la eksportisto ankaŭ bezonas disdoni prezarojn kaj katalogojn fremdlingvajn. Li devas do presigi tiom da fremdlingvaj eldonoj kiom estas fremdaj landoj, kun kiuj li korespondas. Tio ja kaŭzas grandegajn elspezojn!

Iuokaze mi parolis kun estro de granda eksportfirmao. Aludante la grandan nombron da fremdaj skribistoj, vojaĝantoj, kaj fremdlingvaj katalogoj, mi ekdemandis lin: "Viaj elspezoj tiurilate sendube atingas altan sumon ĉiujare, ĉu ne?"

"Certe, Sinjoro," li respondis, "sed tiuj elspezoj estas absolute necesaj, ĉar nur per ili mi povas gajni novajn aĉetantojn kaj pli-grandigi mian negocon. Vere, la monsumo fordonita ĉiujare estas tre granda, superas \$100,000."

"Ĉu vi neniam pripensis la eblecon atingi saman sukceson per pli simplaj rimedoj?"

"Mi estus malbona komercisto kaj kalkulanto ne farinte tion, sed mi ne vidas iun metodon spari tiurilate."

"Eble interesos vin, se mi montras al vi tian metodon."

"Estu konvinkita, ke mi estus dankema al vi pro tio."

"Se ni havus nur unu tutmendan lingvon por la komercaj interrilatoj, ĉu tio ne estus granda helpo kaj plisimpligo?"

"Mi tute konsentas. Sed diru al mi, kiun lingvon vi proponas."

"Sincere mi ne povas proponi iun nacian lingvon, ĉar neniu el ili estas plene taŭga al tiu celo."

"Laŭ mia opinio oni devus elekti la an-

glan, kiu servas kiel komerclingvo ĉe la plej granda parto de la komernacioj de l' mondo kaj havas la plej simplan gramatikon."

"Vi estas prava. Tamen, ĉu ne estas la elparolo tro malfacila por multaj fremdaj langoj? Vi ja estis mem en orienta Azio kaj scias, kiel terure malbontraktas la tieaj popoloj la anglan lingvon. La Anglo mem devas eklerni la tiel nomitan "plgn-anglan" lingvon, por interkompreniĝi kun ĥinoj k. t. p. Cetere la ortografio ne estas konforma al la elparolo. Kaj ĉu vi estas certa, ke la aliaj grandaj komercnacioj akceptus nekontraŭdire tiencelantan proponon?"

"Tute ne. Se ankaŭ internacia kongreso alprenus iun nacian lingvon kiel internacian, kiu havas la potencon devigi tiujn naciojn, kiuj havas alian opinion?"

"Ni nun preskaŭ konsentas. La vivantaj lingvoj ne taŭgas, unue pro tro granda malfacileco, due pro la envio kaj jaluzo de la nacioj. Kaj la antikvaj, la mortintaj lingvoj ekasigas el la konkurso pro sia malmoderneco. Ne estas plu eble adapti lin al la moderna tute aliforma vivo."

"Sed kion nun fari? Tiam ja restas nenio ol krei tute novan lingvon, kiu povas egale konveni al ĉiuj kulturnacioj. Tion fari, laŭ mia juĝo, ni ne estas kapablaj."

"Pardonu, Sinjoro. La revita de vi lingvo jam ekzistas, eĉ vivas. Ĉu efektive vi neniam aŭdis pri Esperanto?"

Nun mi klarigis al mia amiko la esencon de nia lingvo. Ĉiam pli kaj pli mirigite li aŭskultis al miaj vortoj, kiuj rakontis elokvente kaj pri la nesuperebla simpleco kaj pri la jama disvastiĝo de la lingvo. La timon de la komercisto koncerne la malutilo, kiun povas suferi la naciaj lingvoj per tiel simpla perilo komuna al ĉiuj homoj, mi facile sukcesis forigi.

Kiel viro de praktika prudento kaj rapida penso mia amiko baldaŭ konjektis la netakseblan utilon de tia helpa lingvo por la tutmonda komerco.

"Tio certe donos al la tuta komerco grave simpligitan organizon," li diris. "Se mi nur rigardas mian kompare malgrandan komercan organismon, kiel pli travidebla estus estonte ĝia tuta vivo. La unu lingvo sufiĉas por la korespondado kun la dek kvin ĝis dudek landoj, kun kiuj mi nun laboras. Ĉiu el miaj cent komizoj povas lerni ĝin dum mallonga tempo. Ĉiu povas kom-

preni ĉion skribitan al iu ajn en la mondo, ĉu hispana, dana, hungara, rusa aŭ ĥina. Mi ĉiam tre certe scios, ĉu miaj skribistoj skribis tute laŭ mia intenco, kaj mi neniam plu devas per mia subskribo prirespondi leterojn, kies enhavon mi povas ne sufiĉe prijuĝi."

"Bonvolu ankaŭ kalkuli sparaĵojn el-kreskontan el tiu simpligo. Kiom malpli grandaj estos la elspezoj por la salajroj de la fremdlingvaj korespondantoj, kaj vojaĝantoj kaj por la katalogoj. Kaj ankaŭ ni ne forgesu la plibonigon, kiun spertos la komerckontraktoj kun fremdlandaj firmoj. Certe iu malpreciza esprimo jam kaŭzis perdojn, kiuj estonte ne estos eblaj, se la kontraktoj estos skribitaj en Esperanto."

"Via lasta diraĵo kondukas al la oficiala kampo de internaciaj rilatoj. Ili postulas ĉiutage novajn leĝojn intertraktotajn inter la ĉefaj nacioj. Mi nur volas citi la internacian kambiraĵon, pri kiu nun internacia komisiio konsiliĝas. Nun oni devos redakti la tekston en eble dudek lingvoj. Estonte, unu sola sufiĉos, donante tekston neniam malkompreneblan."

"Ĝi estos kvazaŭ oleo faciliganta la turnadon de la radoj de la komercomaŝino. Vi vidas kiel necese estas, ke la komercisto adoptu la praktikajn principojn de la ingeniero. Ankaŭ sur la mona kampo oni komencis reformi. En Esperantujo ekzistas aparta internacia monsisistemo, laŭ kiu ĉiuj pagoj inter Esperantistoj estas farataj, kies unuo estas la Spesmilo, egalvaloranta 2 ŝilingojn aŭ O. 4875 dolarojn."

"Sajnas al mi, ke ankaŭ tiu ĉi sistemo, provota de mi aliatempe, povas esti utila por la pliboniĝo de l' komerca organismo."

"Mi ne velas forlasi vin sen la komunikado, ke laŭ la lastaj sciligoj en esperantaj gazetoj jam sufiĉe granda nombro de industriistoj kaj komercistoj en Anglujo, Francujo kaj Germanujo praktike aplikas Esperanton por la korespondada kaj rek-lama servo, disdonas katalogojn kaj reklamilojn. Laŭsperte la provo jam montriĝis profita. Estas fakto, ke artikolo en esperanta gazeto pri saksa porcelano igis anglan komerciston mendi porcelanaĵojn je la valoro de Sm. 10,000."

"Tiu ĉi fakto instigas min tuj elverki prezaron en la helpa lingvo, kaj sendi

nombbron de miaj deĵorantoj al la kursoj de via grupo. Konvinkite de la utileco de Esperanto, mi ne volas perdi tempon kaj mi mem volas ekstudi la lingvon. Adiaŭ, sinjoro."

Tiu ĉi ĝojiganta sukceso de mia interparolo kun la influa komercisto fortigis en mia cerbo la konvinkon, ke ni nur bezonos ĝustamaniere klarigi al prudentaj kaj akre vidantaj interesuloj la esencon de internacia lingvo; ili ne povas pli longe fermi la okulojn kaj tuj fariĝos fervoraj adeptoj de la progresemaj celadoj esperantistaj. La internaciaj rilatoj de la komerco estas la ĝusta fruktodona kampo por la disvastigo de Esperanto. Komerco kaj Esperanto estas du samcelantaj fraĵoj, Esperanto, laŭ sia interna alta sence, alportas pacon al la popoloj, ĉar ĝi forigas

la lingvajn barojn, kiuj estas la kaŭzoj de multaj malkomprenoj. Kaj la komerco nur povas flori, se la popoloj vivas en reciproka amika konsento. Se la komerco plenumas sian oficon kiel portanto de la kulturo, Esperanto estas ĝia digna kunhelpanto, ĉar ĝi ebligas disvastigi la elpensadojn de eminentaj scienculoj kaj la spertojn de la praktikuloj al ĉiuj popoloj de la mondo.

Se la du grandaj potencoj kunlaboras amike, ili donos al la tuta homaro fortan antaŭenpuŝon ĉe ĝia marsado al la supro de la perfekteco. Kaj fine efektiviĝos mia devizo:

Komerco kaj Esperanto movas la mondon!

W. A. Vogler,
Hamburgo, Germanujo.

RUSA FABELO

LA MALJUNULO KAJ LIAJ TRI BOFILOJ.

IAM vivis maljunulo, kune kun sia maljuna edzino. Ili havis tri filinojn, tiel belajn, ke nenie estis trovebla iu ajn simila.

Ĉefe la maljunulo iris al grenejo por grilo, ensutis iom en sakon, sed dum li ĝin portis hejmen, li ĝin disŝutis. Li eniris en la hejmon, kaj la maljunulino demandis al li:

"Kie estas la grilo?"

"Mi disŝutis ĝin survoje."

"Ho, vi, maljunulo! Se ci ĝin disŝutis, do ci devas ĝin kolekti. Iru tuj, kaj kolektu!"

Ekiris la maljunulo, kaj diris en si mem:

"Ho, se la Suno min varmigus, se la Luno lumigus, kaj Vorono Voronoviĉ (la filo de la korvo) helpus al mi kolekti la grilon, certe mi fordonus al la ruĝa Suno mian plej aĝan filinon kiel edzinon, al la Luno la mezaĝan filinon, kaj al Vorono Voronoviĉ la plej junan!"

Guste kiam li diris tion, la suno lin varmigus, la luno pli supren iris kaj lumigis la vojon, kie la grilo estis disŝutita, kaj Vorono Voronoviĉ helpis al li kolekti la grilon. La maljunulo reiris en la kabanon kaj diris al la plej aĝa filino:

"Vin vestu plej bele, kaj iru al la perono, tie vin renkontos via fianĉo."

La filino iris al la perono, kaj la Suno tie jam de longe atendis. Tuj ĝi kaptis ŝin kaj forportis al si.

La maljunulo ordonis al la mezaĝa filino ke ŝi vestu sin plej bele kaj iru al la perono. Tuj kiam ŝi sin montris, la Luno kaptis ŝin kaj forportis ŝin al si. Tiam la maljunulo diris al la plej juna filino:

"Kaj vin mi fianĉigis kun Vorono Voronoviĉ. Vestu vin plej bele kaj eliru al la perono, tie vin atendas la fianĉo."

La filino eliris al la perono, kaj tie jam de longe atendis ŝin la filo de la Korvo. Tuj kiam li ekvidis sian fianĉinon, li kaptis ŝin, svingis la flugilojn, kaj ŝin forportis.

Tiel estis la gemaljunuloj solaj. Pasis unu semajno, kaj fariĝis enue al la maljunulo, pro foresto de la filinoj. Li diris al sia maljuna edzino:

"Ci, maljunulino, restu hejme, kaj mi vizitos mian plej aĝan filinon. Mi nepre deziras scii kiel ŝi loĝas kune kun la edzo."

Jen aliris la maljunulo al la Suno. La bofilo kaj filino afable salutis lin kaj estis tre ĝojaj.

"Nu, edzinjo, kiel ni regalos la karan

gaston?" diris la Suno. "Pretigu plej rapide fromentajon kaj baku fanojn."

La filino de la maljunulo faris paston, la Suno sin sidigis sur la planko, lia edzino metis paston sur lian kapon, kaj la fanoj tuj estis bakitaj. Iom da tempo gastiginte, kaj manĝinte fanojn, la maljunulo ekiris hejmen. Kiam li alvenis hejmen, la maljunulino komencis demandi al li pri la filino, sed li tute ne deziris aŭskulti ŝin, kaj sidiginte sur la planko ekkriis:

"Pretigu fanojn! Metu la paston sur mian kapon, kaj la fanoj tuj estos bakitaj!"

"Ĉu vi frenezigis? Kiu ajn vidis, ke fanoj estas bakitaj sur kapo?"

"Silentu, maljunulino, kaj faru tion, kion mi ordonas!"

La maljunulino metis paston sur la senharan kapon de la maljunulo. Longan tempon ili atendis, sed la fanoj restis ne frititaj. Oni devis fine baki ilin en forno, kaj la maljunulo, tute ŝmirite de la pasto, devis sin lavi en vaporbanejo.

Pasis ankoraŭ unu semajno, kaj la maljunulo komencis sin pretigi por vojaĝo al la mezaĝa filino.

"Nu, iru," diris la edzino, "sed mi petas ke vi revenu hejmen kiel eble plej baldaŭ."

La maljunulo alvenis al sia bofilo la Luno. Tuj eliris al la perono lia filino kun la edzo, por afable renkonti la maljunulon. La ambaŭ tre ĝojis je lia alveno. La Luno diris al sia edzino:

"Edzinjo, hejtu la vaporbanejon, por ke la maljuna gasto povu sin lavi post la vojaĝo."

Tiel oni faris, kaj la maljunulo, irinte al la banejo, demandis al sia bofilo:

"Kiel do mi min lavos en la malluma ĉambro? La vaporbanejo ne estas lumigita."

"Mi ĝin lumigos por vi," respondis la Luno.

La maljunulo iris en la vaporbanejon, kaj la Luno enŝovis sian fingron en fendon. Tuj fariĝis la internaĵo tute hela.

Iom da tempo gastiginte ĉe sia dua bofilo, la maljunulo reiris hejmen, kaj diris al sia edzino:

"Hejtu kiel eble plej baldaŭ la vaporbanejon; post la vojaĝo mi bezonas min lavi."

"Ĉu vi frenezigis, mia maljunulo?" diris la edzino. "En nia vaporbanejo mankas lumo."

"Mi mem lumigos ĝin, nur hejtu!"

Tial la maljunulino alportis al la vaporbanejo lignajn ŝtipojn kaj preparis ĉion escepte de lumo. La maljunulo, eksterrinte ĉe la pordo, disetendis siajn fingrojn por lumigi la ĉambron. Sed la vaporbanejo restis malluma. Pro la mallumo la maljunulo faletis kontraŭ la sojlo, kaj falis, kun la vizaĝo rekte sur la planke.

"Ho, ci maljuna malsagulo!" ekkriis la edzino. Sed la maljunulo mem tuj ekkomprenis, kio okazis al li.

Pasis ankoraŭ iom da tempo, kaj la maljunulo denove ekvojaĝis, por viziti alian plej junan filinon. De malproksime lin ekvidis la filino, kaj eliris kun sia edzo, Vorono Voronoviĉ, por renkonti la patren. Post riĉa regalado, kiam iom jam mallumigis, la Filo de la Korvo diris al la maljunulo:

"Ni iru por dormi sur la birdstango."

Ili alvenis al birdodormejo, kaj Vorono Voronoviĉ, eksidinte tre proksime de la maljunulo, ŝirmis lin per siaflugilo. Tiel ili bone dormis.

Gastiginte dum unu semajno, la maljunulo reiris hejmen, kaj diris al sia maljuna edzino:

"Jam tedeas al mi dormi sur la forne (en Rusujo la kamparanoj ofte dormas en vitro sur la granda forno, kiu restas la tutan tempon iom varma, kaj tial estas pli komforta lito ol la malvarma planko), kaj mi ne plu deziras dormi tie. Ni iru al la birdostango, tio estos pli oportuna kaj pli agrabla."

"Ĉu ni estas birdoj?" miris la maljunulino. "Mi eĉ ne povas surrampi tien!"

"Mi helpos vin per portebla ŝtuparo," respondis la edzo.

Ne kuraĝis plu la maljunulino malobei, kaj ili ambaŭ iris al la birdodormejo. Tie ili sidigis; sed, pro nekutimo al tio, iliaj membroj rigidigis, kaj kiam ili sin ekmovis por rektiĝi, ili falis malsupren, kaj riĉevis treege dolorigajn kontuzojn.

De tiu tempo, la maljunulo lasis siajn malsagaĵojn, kaj li kaj lia maljuna edzino vivadis feliĉe.

El la rusa tradukis

NIKOLAO FOSS,

Ufa, Rusujo.

BOOK REVIEWS

La Aventuroj de Alicio en Mirlando (Lewis Carroll). Tradukita de E. L. Kearney, M. A. Illustrated with ten drawings by Brinsley le Fanu. 132 pages. Paper, 35 cents. Bound, 70 cents, postpaid.

An attractive translation of a story which has long been deservedly popular in the United States. To read it in Esperanto, to laugh at the amusing adventures and enjoy the exquisite bits of humorous verse, which lose none of their cleverness in translation, becomes still more pleasurable because the printing is clear, the lines well leaded, and the paper of good texture.

Bulgaraĵ Rakontoj (Ivan Minčev Vazov) tradukis At. D. Atanasov. No. 13 of the Esperanta Biblioteko Internacia. 47 pages. 10 cents, postpaid.

The fact that these stories form one of the numbers of the series from which we have learned to expect first-class reading matter, well selected, well translated and in convenient shape, would itself vouch for the excellence of this little book. Nor is the reader disappointed. Each of the five tales is characteristic in some way of the literature here presented in translation, and offers very satisfactory reading.

Patrino Anserino. Tradukis Winifred Sackville Stoner. 30 pages. 25 cents, postpaid.

A daintily bound production, containing portrait of the translator, which is of almost as much interest as the clever rhymes from Mother Goose. Little Miss Stoner is one of the favorite child esperantists of this country, and personally known to many of the "samideanoj," who will find this book not only interesting in itself, but a good "propagandilo," as showing what a six-year-old child achieved in Esperanto.

La Karavano (Wilhelm Hauff) tradukis J. W. Eggleton. 106 pages. 35 cents, postpaid.

The stories in this collection are justly popular not only in the original German, but in any language which possesses a translation. It is eminently suitable that

a genuine classic of this nature be translated into Esperanto, and the rather small print permits at least a large amount of good reading matter in compact space. The book is well worth reading.

Folioj de la Vivo (Santiago Rusinol) tradukis Alfonso Sabadell. 106 pages. 30 cents, postpaid.

The work of a well-known Catalan author, translated by an esperantist whose name is familiar to all. A collection of short sketches, meditations, anecdotes, the majority with a note of melancholy, but gracefully written, and a welcome addition to Esperanto literature.

Unuaj Agordoj. Poezioj de Wiktor Elski kaj Eska. 96 pages. 20 cents, postpaid.

This is the third number of the series, which began with "Ama Bilet" and "A, B, C," in a Polish "Biblioteko." Some of the original poems are genuine poetry, others contain less of the divine fire. All are readable, however, in spite of a few lapses in the formation of the verse and in the language; therefore, the book is to be recommended to readers poetically inclined.

Salome (Oscar Wilde) tradukis H. J. Bulthuis. 39 pages. 30 cents, postpaid.

The original drama has received much publicity of late, and is now obtainable in Esperanto, translated by an Esperantist of Holland, as the first number of a series, "Esperanta Teatro Internacia." The print is clear, and the same may, in general, be said of the Esperanto throughout the play.

Veneno. Unuakta Komedio de Ramon Limones. 30 pages. 35 cents, postpaid.

A short easy comedy, in which the bottle of brandy, labelled "poison," leads the lovers through the Romeo and Juliet adventures naturally to be expected. The Esperanto is praiseworthy, and the little book is the more to be recommended as it comes from our neighbors, being a Mexican contribution to Esperanto literature.

La Litadmonoj de Sinjorino Kodel (Douglas Jerrold) tradukis James Robble. 30 pages, 10 cents, postpaid.

These amusing curtain lectures will furnish desirable reading matter for those who like to read in Esperanto something which has already been read at some time or other in English, so that the memory of the content obviates somewhat the need of the dictionary.

La Evangelio laŭ Sankta Johano. Tradukita de Dro. D. O. S. Lowell, Prof. W. J. Grinstead, Rev. R. P. Anderson. With eight illustrations. 64 pages. 10 cents, postpaid.

This translation from the original Greek, in convenient pocket size, is emphatically to be recommended as a desirable addition to the translations from the Bible now obtainable in Esperanto.

Noto pri la Inicilo Matematika, de Jacques Camescasse. 31 pages, and colored plate: 30 cents, postpaid.

This book describes what might be called a mathematical toy—namely, the use of a set of 1,200 cubes, half red, half white, each exactly a centimetre in size, and 144 steel rods, for which the cubes are grooved. (This is an adaptation of the book "L'Initiation Mathématique," by C. A. Laisant, whose purpose is to show how the principles of arithmetic can be taught to children by experimental methods.) The book explains how, by this method, arithmetical and algebraic operations can be demonstrated, the decimal system made clear, and other combinations and mathematical facts given visual proof. This is another gratifying example of the use of Esperanto in other fields than that of pure literature, and is, therefore, to be recommended to those interested in mathematics, whether because of the subject itself or the effect of the "propagandilo" for which it may be used.

La Aritmetika Kalkulbastono, de P. Berland. 23 pages, parallel French and Esperanto. Including apparatus, \$1.00, postpaid.

An ingenious invention, consisting of two rods about 13 inches long, whose use,

as explained in the book, is to facilitate addition, multiplication and division, by the use of an application of logarithmic methods, rather than the primitive ways to which the average person clings. Another good demonstration of the use of Esperanto in scientific productions,

Fatala Suldo (Lionel Dalsace) tradukis Eugénie Ferter-Cense. 318 pages. \$1.00, postpaid.

A novel whose scene of action is located in France and Italy, with an excursion back into the dim past, to investigate the reasons for certain occurrences and certain incarnations,—for the plot is in general along theosophical lines. The Esperanto is sufficiently clear and the tale sufficiently interesting to make the book one of interest.

Minna de Barnhelm (Gotthold Ephraim Lessing) esperantigita de Adolf Reinking. 84 pages. 45 cents, postpaid.

This translation of a classic comedy adds another to the list of German works now accessible in Esperanto. Barring a few peculiarities of diction, the language is simple, and the translator studiously avoids words and constructions which seem to him complicated.

Ne Dezirita, Ni Virinoj (Johanna van Woude) esperantigis Maria Posenauer. 31 pages. 25 cents, postpaid.

Two short stories, or, rather, sketches, which portray the thoughts and emotions of the spinster, analyzing her own lot in contrast to that of her married friends. Both are rather emotional portrayals, from an American point of view, but add to the field of Esperanto literature an interesting glimpse into the work of an author from Holland.

La Vizito en la Karcero (Ernest Eckstein) tradukis Rud. Freericks. With seven illustrations. 47 pages. 25 cents, postpaid.

A humorous account of the adventures of a German schoolboy in opposition to the schoolmaster. An experiment with dialect, which, therefore, needs some care in reading in order to avoid ambiguity of meaning.